

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 5-a parto
Claude Gacond, 269-a radioprelego, 1968.12.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la rakonton pri la restado de Gandhi en Svislando. La hinda gvidanto estis la gasto de la franca verkisto Romain Rolland. Ni hodiaŭ tradukos parolojn, kiujn Gandhi prononis en mitingo okazinta en Lausanne la 8-an de decembro 1931. Ili alportas informojn pri la religia penso de la Mahatma.

A.- Oni faris al Gandhi la ĉi sekvan demandon :

Cl.- « *Kial vi rigardas Dion, kiel la Veron ?* »

A.- Laŭ la tagĵurnalo de Romain Rolland Gandhi respondis tiel :

Cl.- « *En mia junaĝo oni instruis al mi, ke la hinduaj Skriboj konas preskaŭ unu milon da nomoj por Dio ! sed ke tiu milo da nomoj nule sufiĉas.*

A.- *Mi kredas, ke Dio posedas tiom da nomoj, kiom ekzistas da vivantoj, kaj pro tio ni ankaŭ diras, ke Dio estas sennoma.*

Cl.- *Kaj ĉar Dio havas multajn formojn, ni lin ankaŭ konsideras kiel senforma.*

A.- *Kaj ĉar li parolas en ni en multaj lingvoj, ni konsideras lin kiel senparola.*

Cl.- *Kiam mi ekstudis la islamon, tiam mi vidis, ke la islamo ankaŭ konas multajn nomojn por Dio.*

A.- *Kun tiuj, kiuj diras, ke Dio estas Amo, mi diras : Dio estas la Amo.*

Cl.- *Sed plej profunde de mi, mi pensis, ke kvankam Dio povas esti Amo, Dio super ĉio estas la Vero.*

A.- *Se estas eble al la homa lingvo doni la plej kompletan priskribon de Dio, mia konkludo estas, ke por mi, Dio estas la Vero.*

Cl.- *Sed antaŭ du jaroj, daŭrigis Mahatma Gandhi, mi antaŭen iris unu paŝon pli foren, kaj mi diris, ke la Vero estas Dio.*

A.- *Mi alvenis al tiu konkludo post senĉesa serĉado al la Vero, kiun mi komencis proksimume antaŭ kvindek jaroj.*

Cl.- *Tiam mi malkovris, ke la plej fidela alproksimiĝo al la Vero iras tra la Amo.*

A.- *Sed mi malkovris, ke en la angla lingvo la vorto Amo posedas multajn signifojn, kaj ke la homa amo, vidata laŭ pasia vidpunkto, povas fariĝi io malnobliga.*

Cl.- *Mi ankaŭ agnoskis, ke la Amo, kun la signifo **ahimsa** (absoluta neperforto) havas nur etan nombron da fideluloj en la mondo.*

A.- *Sed por la vorto Vero mi ne trovis duoblan signifon.*

Cl.- *Eĉ la ateistoj ne dubas pri la neceso aŭ povo de la Vero.*

A.- *En sia pasio por la malkovro de la Vero la ateistoj ne hezitis nei la ekzistadon de Dio, kaj laŭ ilia vidpunkto, ili pravas.*

Cl.- *Pro tiu argumentado mi vidis, ke anstataŭ diri: Dio estas la Vero, mi devas diri : « La Vero estas Dio. »*

A.- *Post tiu argumentado Gandhi montris, ke tiu difino povus unuigi la homojn. Li tamen atentigis, ke se en la nomo de Dio oni faris monstraĵojn, scienculoj ankaŭ faris monstraĵojn en*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 5-a parto
Claude Gacond, 269-a radioprelego, 1968.12.04 & 07

la nomo de la Vero. Tiu fakto por li ne malpravigas la serĉadon al la vero, sed montras, ke la homa spirito estas limigita. Por Gandhi oni devas esti konscia pri tiuj limoj, kiam oni klopodas priskribi Eston aŭ Enton, kiu estas transa al nia komprenpovo. Ni ankoraŭ citu lin :

Cl.- « Ni havas parolon en la hindua filozofio : « Dio sola estas, nenio alia estas. »

A.- Kaj la saman veron vi trovos reliefigita kaj ilustrita en la **Kalema** de la islamo. La sanskrita vorto por **Vero** litere tradukita signifas : « Tio, kio ekzistas : **Sat**. »

Cl.- Pro tio, kaj pro aliaj kaŭzoj, mi alvenis al la konkludo, ke la difino « La Vero estas Dio » alportas al mi la plej grandan kontenton.

A.- Kaj kiam vi deziras trovi la Veron kiel estanta Dio, la unika neerarigebla rimedo estas la Amo, tio estas la Neperforto. »

Cl.- Konklude Gandhi ankoraŭ aldonis : « Kaj ĉar mi estas konvinkita, ke fine la rimedoj kaj la celo estas interŝanĝeblaj terminoj, mi ne hezitus diri, ke Dio estas Amo. »

A.- Tiu interŝanĝebleco inter la rimedoj kaj la celo estas tipa al la penso de Gandhi. Pro tio li tiom severis pri la rimedoj. Por li maljustaj rimedoj maljustigas la celon. Perforto por li estas io en si mem maljusta, eĉ se perforto celas la juston.

Cl.- En tiu mitingo okazinta en Lausanne tiuj klarigoj ege interesis la publikon. Estis interesa kontakto kun la hinduismo. Multaj en la paroloj de Gandhi vidis reviviĝon de la paroloj de Kristo. Pro tiu intereso pliaj demandoj tuŝis tiun temon. Unu el ili estis :

A.- « Sed, kio do estas la Vero ? »

Cl.- « Jen malfacila demando, respondis Gandhi, sed mi ĝin solvis por mi mem, dirante, ke ĝi estas, kion la interna voĉo diras al ni. »

A.- Gandhi daŭrigis : « Vi tiam demandos : sed kial malsamaj homoj alvenas al malsamaj kaj kontraŭaj veroj ?

Cl.- Nu, ni konstatas, ke la homa spirito laboras helpe de sennombraj perantoj, kaj ke la evoluo de la homa spirito ne estas la sama por ĉiuj.

A.- Sekvas, ke tio, kio povas esti la vero por unuj ne estas la sama por ĉiuj.

Cl.- Kiuj faris eksperimentojn, tiuj alvenis al la konkludo, ke estas necese observadi precizajn kondiĉojn, kiam oni faras tiujn eksperimentojn. Por povi fari sciencan laboratorian eksperimentadon, oni unue devas sekvadi bazajn kursojn pri scienco. Tiuj kursoj estas nepre sekvendaj kaj nepre necesaj.

A.- Same estas, por ke persono havu la rajton kaj kapablon fari eksperimentojn en la spirita tereno. Strikta prepara disciplino estas nepre sekvenda kaj nepre necesa.

Cl.- Pro tio, antaŭ ol paroli pri sia interna voĉo, ĉiu devus ekzakte studadi siajn proprajn limigojn.

A.- Ni alvenis al la konvinko, kaj tio estas bazita sur la eksperimentado, ke kiuj volas fari individuajn esplorojn pri la Vero kiel estanta Dio, tiuj devas nepre observadi precizajn promesojn, kiel ekzemple la promeson pri Vero, la promeson pri **Brahmaĉarja** (ĉasteco), ĉar ne estas eble partigi nian amon por la Vero kaj Dio kun io ajn alia, - la promeson pri Neperforto, la promeson pri Malriĉo kaj Ne-posedo.

Cl.- Se vi ne devigas vin observadi tiujn kvin promesojn aŭ regulojn, vi absolute ne povas vin meti sur la vojon por la eksperimentado pri la Vero.

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 5-a parto
Claude Gacond, 269-a radioprelego, 1968.12.04 & 07

A.- *Kelkaj aliaj kondiĉoj estas preskribitaj, sed mi ne havas la tempon paroli pri ili. Sufiĉas menciigi, ke kiuj faris tiun eksperimentadon, tiuj scias, ke ne konvenas al iu ajn pretendi, ke li aŭdas la voĉon de la konscienco.*

Cl.- *Kaj ĉar hodiaŭ ĉiu postulas la rajton al mempensado sen esti sekvinta instruado, kaj ke tiom da ne-veroj estas proponataj al la erarigita mondo – kiom mi povas diri al vi, en vera humileco, tio estas, ke la vero ne povas esti trovata de tiu, kiu ne atingis abundan humilan sintenon. »*

A.- Per tiu traduko el la tagĵurnalo de Romain Rolland ni provis doni al vi ideon pri la religio de Mahatma Gandhi.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-